

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten
im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 6

Novembro/Decembro 1973

17. Jahresversammlung der deutschen Eisenbahner-Esperantisten



Blick über die Rheinanlagen zur Festung Ehrenbreitstein

Foto: Fremdenverkehrsamt Koblenz

GEFA kunvenis en la romantika Rejnvalo

Koblentz, la „Confluentia“ inter Rejno kaj Mozelo, pro saĝo, ne pro batalemo de siaj loĝantoj transvivis multajn konkerantojn kaj okupantojn dum sia dumil-jara historio. Evoluinta el grava trafika pozicio la urbo okupas ankoraŭ hodiaŭ atentindan rangon en la rejnlanda ekonomia vivo.

Antaŭ tia fono areto da fake organizitaj praktikantoj de Lingvo Internacia evidente ne sukcesis vekti sufiĉan atenton, eĉ iom perdiĝis en stacio, stratoj kaj kongreshalo de la grandurbo. Kvankam ĉirkaŭ 150 kongresanoj kun gastoj el 10 landoj estis kunvenintaj kaj kvankam reprezentantoj el la fervoja administracio, de sindikatoj kaj personaro fervojista kun fervoro kaj sincera simpatio salutis la 17an jarkunvenon de GEFA kaj la klopodojn pri la lingvo ĝenerale, tamen la evento restis ŝajne sen publika eĥo. Tion oni bedaŭras des pli, ĉar la programo de la semajnfino havis vere valoran nivelon klerigan kaj distran; ne mankis la librostando de Ludwig Pickel kaj ankaŭ ne la migranta ekspozicio de Kurt Jentsch.

Jam vendredon, la 5an de Oktobro vespere post akcepto en la stacidomo multaj renkontiĝis en la apud-kongreseja vinvilaĝo, kiu ĉi-tempe efikis ja trista kaj kalva; vera gajo, prorevida ĝojo kaj bonhumora konversacio sonis nur el la kabano de la GEFA-anoj. Sabaton, kiam kunsidis la komisiitoj kun la estraro, samtempe gvidis dungitoj de la turisma oficejo la neokupitojn tra kelkaj malnovaj kvartaloj, sub la devizo: „Bedaŭrinde ni ne havas sufiĉe da tempo!“ La vizitantoj aŭdis pri historiaj okazaĵoj kaj spertis mem, kiel la kanalligo de Mozelo (laŭ fakprelego de la kvara IFEF-kongreso ankoraŭ projekto diskutata) hodiaŭ ŝanĝas ne nur la iam idilian valpejzaĝon, sed ankaŭ la tradician vizaĝon de tiu ĉi urbo apud la Rejn-Mozel-angulo.

Komuna ŝipekskurso posttagmeza kreis tiun prikantitan etoson de granda rondo familia. Ĉi vekis ankaŭ memorojn el infanaĝo, kiam ja multaj vaporsĉipoj sur la riverego kaj la lokomotivoj ambaŭflanke tenis post si dikajn fumraŭpojn, sed la akvo bluverda estis ankoraŭ viva kaj freŝodora; fiŝistoj kaptis angilojn, salmojn kaj plotojn. Tamen kasteloj kaj ruinoj ŝajnis netuŝitaj de tiu duona jarcento, kaj kiel tiam, nur en alia lingvo, nia komuna, sonas la klarigoj pri urbetoj, vilaĝoj kaj konstruaĵoj ĉe la bordoj. Dumbabile trintante oni tro baldaŭ atingis la ekskurs-

celon. La vojaĝantaro disgrupetiĝis rapide en Braubach albordeĝinte. Por kelkaj ekskursanoj ne ekzistis diskuto, ĉu ataki la krutajn vojejojn por vizito al kastelo Marksburg, aŭ ĉu por almenaŭ 90 minutoj partopreni la rikoltfeston de la pitoreska urbeto, ĝuante la fortikan aspekton de alte surmontaj muroj, kreneloj kaj turoj nur el la ranperspektivo, pli vere tra la vinglaso. La varia programo de la salutvespero evidente trovis la intereson ankaŭ de la reprezentantaj gastoj, kiuj ne nur vortumis simpatian pri la Lingvo Internacia, sed realisme argumentis por ĝia utilo kaj neceso. Distriktkomisiito Herlitzte malfermis la programon kaj prezidanto Gießner bonvenigis la kunvenintaron. Sinjoro Jacobs kiel anstataŭanto de la direkcia prezidanto sa-



Barbara Kohl el Luksemburgo kronis la oficialan parton

lutis ankaŭ por la distriktestraro de BSW kaj en la nomo de la elektitaj personaraj reprezentantoj (BPR); li ĝentile komprenigis sin per nia lingvo samtempe al la eksterlandaj gastoj. Por la fervojistaro en Koblenz parolis sinjoro Tekaat, ĉefo de GV. Sinjoro Bruchof por la ĉefestraro de la sindikato GdED transdonis salutojn kaj menciis siajn proprajn junaĝajn fervorajn

klopodojn pri Esperanto. La fervojista sindikato GDBA sciigis siajn sukcesdezirojn kaj favorojn per la buŝo de sinjoro Hekker. La ĉefestraro de BSW ne povis delegi kompetentulon, ĉar samtempa ĝenerala kunveno de FISAIC venigis ĝiajn funkciojn al Salzburg. Fine oni ĝojis revidi kaj aŭdi vicprezidanton van Leeuwen por IFEF kaj la gekolegojn de Sutter, Hauge, Robiollé, Lipičar, de Jonge, Rügge, Glättli por sep landaj asocioj.

Orkestro kadrumis la oficialan parton kaj Barbara Kohl el Luksemburgo kronis ĝin, kantante per sia sonplena soprano plurajn tekstojn tradukitajn de Joachim Gießner. Alia kulmino de la programo estis la unuakta dramo „La advokato“ kun kredinda pasio prezentita de la konata aktoro Michel Audibert el Parizo. Sufiĉe longe la dancemuloj pacience atendis sian vicon. La sama kapelo „The Monkeys“ (kial simioj?) trovis bonan muziktemperaturon inter ardo kaj adaĝo, kontentigante ĉiun aĝon kaj ĉian temperamenton. Dimanĉon Ralph Harry, nia ambasadora moŝto aŭstralia en Bonn, vidigis du ak-

tualajn filmojn pri la hodiaŭa ĉiutago en la kvina kontinento kaj pri la nuntempa situacio de la aŭstralia fervojo. Sinjoro Harry surprizis la fervojistojn per fundaj konoj pri historio kaj evoluo de „Transportado en Aŭstralio“. Tiun ĉi fakprelegon oni legos okaze en unu el niaj organoj Bulteno aŭ Internacia Fervojisto.

Kun la IFEF-sekretariino Elfriede Kruse la aŭditorio vojaĝis al Japanio. Ŝia lumbildraporto pri la 60a Japana Esperanto-Kongreso kaj pri la vizitoj al pluraj geamikoj en diversaj lokoj, pri urboj, pejzaĝoj kaj tipaj eventoj realigis freŝajn, vivajn impresojn el tiu por ni tro foro mondo.

La kunsidoj de estraro kaj komisiitoj pritraktis i. a. kongresproponon por la IFEF-kongreso en Tarragona, instalon de nova ekzamenkomisiono, projekton feriokursan, utiligon de fakprelegaj tekstoj, jarraportojn el la distriktoj kaj aliajn aktualaĵojn aferojn. Kolego Müller kiel komisiito por distrikto Nürnberg invitis la 18an jar-kunvenon al la artaĵorika Bamberg, la 1000jara urbo Castrum Babenberh. wbr

Jarraporto pri la periodo inter la 16a kaj 17a jarkunvenoj

Estu nia unua honora devo, memori pri la mortintoj de la pasinta jaro. Ni eksciis pri

Otto Schmidt (87), 25. 10. 72
Carl Mailand (80), 25. 2. 73
Otto Rosenzweig (66), 14. 5. 73
Leo Bald (78), 6. 7. 73
Karl-Heinz Meyer (45), 17. 8. 73

Ili restos en nia memoro kaj trovu pacan ripozon.

Organizaj aferoj

Por 1973 GEFA kotizis al IFEF por 850 membroj. La kotizo restis sama kiel en la antaŭaj jaroj, nome 5 GM.

De unu jaro la **laborkonsilantaro** laboras en nova konsisto. Ĝi kunvenis trifoje (Clervaux, Koblenz, Würzburg), inter tiuj dufoje kun la komisiitoj por specialaj taskoj. Pri la ĉefaj traktaj punktoj estis raportita en „Bulteno“.

Ankaŭ inter la **distriktkomisiitoj** ni devas konstati diversajn ŝanĝojn. En München la komisiito Schmid forlasis la fervojon. Sekvis lin longjara esperantisto Josef Weidacher. En Saarbrücken transprenis post dejora foriro de kolego Hauthenthal nova kolego Norbert Müller la gvidadon. Dankon al la foririntoj pro long-

jara kunlaboro, bonvenon al la nove venintoj kaj plej bonajn dezirojn al ili.

Laŭ la donitaj indikoj en aŭtuno 1972 komenciĝis **5 kursoj** kun entute 34 partoprenintoj. Laŭ ĝisnunaj spertoj oni povas kalkuli pri 15 personoj, kiuj eltenis ĝis fino de la kursoj. Jen unu el niaj plej necesaj taskoj plialtigi la nombron kaj de la kursoj kaj de ties partoprenantoj.

La klopodoj, restarigi la dormantan **ekzamenkomisionon** de GEFA, je progresis, tamen ne jam kondukis al solvo, ĉar la kompetentaj instancoj de la Germana Esperanto-Instituto simple ne reagas, t.e. ne donas sian benon, kvankam sufiĉe da kapabluloj jam delonge estas pretaj eklabori. Nu, forŝovita ne estas fordonita.

Dum vizito ĉe la administranto de la **arkivo**, kolego Barmaneter, ni povis konstati, ke ĝi troviĝas en bona ordo en la subtegmento de novkonstruita domo. Ĉiuj objektoj, kiuj estas gravaj por la historio kaj evoluo de GEFA, bonvolu sendi al kolego BOS Barmaneter, Bahnhof Woringen (Schwaben) über Memmingen, kiu konservos ilin.

Kunlaboro en IFEF

Menciinde certe estas, ke la unuan de januaro ekvalidiĝis la nova **IFEF-statuto**, kiu ankaŭ por ni kunportis kelkajn novaĵojn. Ĉiu interesulo povas peti ĝin ĉe la GEFA-sekretariino, BHS' in Kruse, BSA Frankfurt/Main.

En la **25a IFEF-Kongreso** Aarhus (Danlando) partoprenis preskaŭ 100 germanoj inter ili konsiderinda nombro da „veteranoj“, el kiuj tamen multaj ne aspektis tro veterane. Sed la jubilea kongreso estis kaŭzo honorigi ne nur tiujn, kiuj ĉeestis en la unua kongreso aŭ eĉ pli frue, sed ankaŭ tiujn, kiuj minimume 20 jarojn aktive kunlaboris en siaj landaj asocioj.

La **kunlaboro en IFEF** de kelkaj el niaj membroj daŭris, nome Gießner kaj Kruse kiel prezidanto kaj sekretariino, Brandenburg kiel gvidanto de la Fakprelega Komisiono. La longjara gvidanto de la Terminara Komisiono, Ritterspach, transdonis tiun oficon en la manojn de la jugoslava kolego Sekereš. La Statutkomisiono, gvidita de Barnickel, plenumis siajn taskojn kaj ĉesis ekzisti fine de 1972.

GEFA partoprenis en du enketoj, aranĝitaj a) pri la vivkondiĉoj de la emerituloj (flanke de la svisa landa asocio) kaj b) pri diversaj ĝeneralaj problemoj de aktivaj fervojistoj flanke de la japanaj kolegoj.

Kontaktoj, aranĝoj

Plej grava okazintaĵo sendube estis la triasocia kongreseto en Clervaux (Luksemburgio) en Oktobro 1972, kiu inkludis la 16an germanan jarkunvenon. Pli ol 100 germanoj estis inter la 300 ĉeestantoj kaj la celo, informi la luksemburgiajn kolegojn pri la ekzistado de la Internacia Lingvo, estas atingita, ĉar en ĉiuj deĵorejoj de CFL pendis la afiŝoj pri la kongreso.

Membroj de GEFA krome partoprenis en la internacia skisemajno Werfenweng (Aŭstrujo), en la plurlanda kongreso en Luksemburgo (kiu inkludis la 51an GEA-Kongreson), en al Universala Kongreso Beogrado, en la SAT-kongreso en Toronto, en la 60a Kongreso de japanaj Esperantistoj, en la svisa feria semajno, kaj okazis multnombraj vizitoj de GEFA-membroj ĉe najbaraj IFEF-asocioj. Entute la kontaktoj al aliaj organizaĵoj kaj al niaj sindikatoj restis en bona stato, precipe al BSW, en kies kadro principe estas farita nia laboro. BSW multe helpas al ni kaj meritas nian sinceran dankon.

Informado

Nia komunikilo „Bulteno“ aperis kiel kutime en 5 rutinaj eldonaĵoj kun 38 paĝoj en eldonkvanto de 1300. Spite al sia modesta amplekso ĝi certe respegulas la vivon de nia asocio sufiĉe klare. Speciala numero de „Bulteno“ aperis kiel informilo en germana lingvo direktita al neesperantistoj. Ĝi estis distribuita inter alie al la

„Bezirksvertreterversammlungen“, kaj la sindikatoj eĉ distribuis ilin grandskale pere de siaj internaj vojoj. Entute estis disdonitaj 18000 ekzempleroj. Ankoraŭ je dispono estas konsiderindaj restoj de la informilo „Direkter Draht“ kaj de la afiŝoj „Esperanto erstklassig“. Bonvolu peti ilin de kolego Brandenburg.

En la „BSW-Report“ nun de pli ol unu jaro ekzistanta kvarpaĝa rubriko de „Sozialblatt“ ni kelkfoje lokigis raportetojn kaj anoncojn pri niaj aranĝaĵoj. Oni ne plu akceptas longajn raportojn, sed pli ofte koncizaĵojn. Ankaŭ en „Bundesbahn“ aperis artikolo pri la jubilea kongreso. Same publikigis po kelkajn raportojn la sindikataj revuoj. Kaj ankaŭ en la Oficialaj Bultenoj de la direktoj kaj de DB indikoj pri niaj kunvenoj estis troveblaj. En la **taga gazetaro** ni povas kalkuli pri minimume 150 artikoloj pri nia agado.

Tute novan **ekspozicion transporteban** kreis nia emerita kolego Jentsch. Ĝi estis montrita la unuan fojon en Clervaux. Estas dezirinde, ke ĝi tre ofte estos utiligata. La rapidaj kaj koncizaj informoj de „Pilo-Press“ estas abonitaj de kelkaj el niaj distriktoj. Estas rekomendinde, uzi ilin kiel eble plej amplekse.

Estas nia intenco, iel utiligi la 2 fakprelegojn de la 25a kongreso. Tamen ankoraŭ ne pretiĝis la tradukita manuskripto pro diversaj kaŭzoj, kiuj ne estas niaflankaj.

Diversaĵoj

Laŭ deziro de la ĉefestraro de BSW, kiu disponigis pli altan sumon tiucele, estis eble aŭ doni modestan sumon al **emerituloj**, partoprenintoj en IFEF-kongreso aŭ belan libron kiel kristnaskan donacaĵon. Por la kuranta jaro estas planitaj 2 regionaj kunvenoj por nur emerituloj, el kiuj unu jam okazis en junio en Hamm kun tre kontentiga rezulto. Post la dua, antaŭvideble en Würzburg, ni raportos pri la spertoj kaj rezultoj en „Bulteno“. Ĉiukaze ni atingos per tia nova kunvenmaniero multajn pliaĝulojn, kiuj ne plu deziras aŭ kapablas viziti internaciajn kongresojn.

La vivo de nia asocio estas tiom riĉenhava, multflanka kaj ampleksa, ke ne eblas, tuŝi ĉion, kio meritas traktadon. Sufiĉu la donita superrigardo, kaj ni finu kun la memkonfeso:

Multe pli grava ol raporto estas la aktiva agado de ni ĉiuj. Tiun agodon ni sincere petas de ĉiu unuopa membro.

Frankfurt/M, en Oktobro 1973
Joachim Gießner
Prezidanto de GEFA

Daniel Jäger, Frankfurt/Main ne plu vivas

Ĉi tiu sciigo trafis nin ĝuste dum la jarkunveno en Koblenz, sen ke eblis akompani nian longjaran amikon dum lia lasta iro, ĉar jam li ne plu estis sur la tero. Nenio restis al ni ol konatigi la funebran novaĵon al la ĉeestantoj de la jarkunveno.

Daniel Jäger naskiĝis la 23an de Julio 1899 kaj mortis la 29an de Septembro 1973. Li estis unu el niaj veraj aktivuloj, ĉiam helpopreta, bonvola, nepre fidinda, ĉiam afabla, amika, nobla. Plurajn jarojn li estis ano de la GEFA-estraro, en kiu li speciale respondecis la fakon instruado. Volonte ni ŝatis liajn bone fundamentitajn opiniojn kaj konsilojn. Jam la fakto, ke antaŭ kelkaj jaroj li devis retiriĝi el la aktiva kunlaborado pro malsano, estis bato por nia laboro. Nun li postlasas breĉon, kiun oni ne rapide povos fermi.

Daniel Jäger estis kaj restos nia amiko, kiun ni ne forgesos. Al lia edzino kaj familio ni sincere kondolencas.

por la GEFA-estraro Gießner, prezidanto

Aparte tragike estas, ke en la tirkesto de la GEFA-redaktoro jam kuŝis manuskripto, verkita de Willi Barnickel, pri la „veterano Jäger“, kontribuaĵo por la serio „veteranoj“ en la „Bulteno“ de GEFA. Ĉi tamen sekvu ĉi tie, nur iomete adaptita al la cirkonstancoj:

Daniel Jäger apartenis al tiuj esperantistoj, kiuj agadis por Esperanto de multaj jaroj, sen bruo, sed kun fidindeco kaj talento. Lia vojo al Esperanto estis iom eksterordinara. La unuajn informojn pri la Internacia Lingvo donis al li la staciestro de malgranda brita stacio, en kies proksimeco la juna militkaptito dum la unua mondmilito laboris en farnejo. Post la fino de la milito komenciĝis la streĉa kariero de fervojisto, kiu dum ekonomie malfacilaj jaroj devis grimpi pene unu ŝtupon post la alia. Kiam, en 1935/36, fine estis iom pli da tempo por kontaktiĝi kun esperantistaj kolegoj, la tiama reĝimo abrupte finigis ĉian agadon por la Internacia Lingvo.

Nur post la fino de la dua mondmilito la esperantistoj en Germanio povis aktivigi sen politika premo. En Oktobro 1945 komenciĝis denove la Esperanto-agado. Ankaŭ la fervojistaj esperantistoj kunvenis. La neforgesita fervoja direktoro Schuchmann, poste ĝenerala reprezen-

tanto de la DB por Francio, instruis ankaŭ Daniel Jäger, kiu apartenis al la kunfondintoj de la Esperanto-grupo fervojista en Frankfurt. Jäger transprenis baldaŭ mem la instruadon. Tio kondukis lin en 1959 ankaŭ al kunlaboro kun la leterlernejo de la Germana Sindikata Ligo (Fernlehrinstitut des DGB), kiu eldonis lian korespondan kurson en kvanto de 500 ekzempleroj. La ekzamenojn pri lingva kapableco kaj kursgvidanto sekvis en 1961 la nomumo flanke de la Germana Esperanto-Instituto kiel ekzamena komisaro en nove starigita ekzamenkomisio de GEFA. En 1967 li fariĝis membro de la kuratorio por fako ekzamenoj de tiu instituto. Kiu atente legis la publikigaĵojn de GEFA, IFEF, UEA, SAT, kaj LEA, kies membro li estis, trovis ofte artikolojn de li, originajn aŭ tradukitajn. Ke lastatempe. Laŭeble li vizitis kongresojn,



Lastan fojon ni vidis nian forpasintan amikon Jäger en la jubilea kongreso de Aarhus. Foto: Jentsch

entute proksimume 20. Li ĉeestis la lastan IFEF-kongreson en Aarhus kaj tie estis honorigita kiel veterano.

Oni demandas sin, sur kio bazis lia fideleco al Esperanto. Estis la „Interna Ideo“, nuntempe ofte atakita kaj pridubita. Kiel Daniel Jäger mem eksplikis, Esperanto malhelpas naciismon, antaŭjuĝojn kaj lingvan diskriminacion. Ĝi edukas al toleremo kaj havigas multajn amikojn en diversaj landoj. La konsiloj, kiujn li donis al ni GEFA-anoj, estis kaj estas utiligeblaj de ĉiu unuopulo: pliperfektigi sian lingvokapablecon, forigi antaŭjuĝojn per bonaj informoj kaj trafaj argumentoj, konvinki gravulojn.

Ni honoru nian meritplenan mortinton Daniel Jäger, ĉiam sekvante liajn konsilojn. W. B.

Am 10. Dezember 1973 - 25 Jahre Charta der Menschenrechte

Die Vereinten Nationen (UN) und die UNESCO haben die mit ihnen zusammenarbeitenden Organisationen gebeten, der 25. Wiederkehr des Jahrestages der Annahme der Allgemeinen Erklärung der Menschenrechte zu gedenken. Zu diesen Organisationen gehört auch der Esperanto-Weltbund, dem der Internationale Verband der Eisenbahner-Esperantisten als Fachverband angeschlossen ist. Und insofern geht auch uns diese „Charta“ besonders an.

Eine unserer wichtigsten Aufgaben, die Weiterentwicklung der Fachausdrücke des Eisenbahners in der Internationalen Sprache Esperanto, wäre nicht denkbar ohne die Artikel der Menschenrechtserklärung, in denen u. a. die Diskriminierung von Menschen oder Menschengruppen ihrer Sprache wegen verboten ist. Einer der vornehmsten Grundsätze der Esperantisten ist es bekanntlich, den **Angehörigen aller Sprachgruppen** gleiche Chancen einzuräumen.

Gleich der erste Artikel der Charta erwähnt die Respektierung der Rechte und Freiheiten aller Menschen ohne Unterschied ... der Sprache. Und diese Gleichbehandlung im Hinblick auf die Sprache wird noch in einer ganzen Reihe weiterer Artikel der Charta gefordert. Wie so oft klafft allerdings zwischen Forderung und Ausführung mancherorts eine erhebliche Lücke, so schon im Hause der Vereinten Nationen selbst, wo einige wenige Länder mit stark verbreiteten Sprachen die weit über 100 anderen Mitgliedsländer trotz der Charta diskriminieren. Dieser Brauch setzt sich fort z. B. in der UNESCO, EG, wie überhaupt in allen internationalen Gremien einschließlich solcher der Eisenbahnen, als da sind Fahrplan- und Tarifkonferenzen, technische Beratungen, Kongresse und Symposien, wo überall die Kleinen von den Großen sprachlich mundtot gemacht werden. Ganz zu schweigen von den unvorstellbaren Kosten dieses Verfahrens.

Bei uns gibt es keine sprachliche Diskriminierung, weil wir keine Verständigungsschwierigkeiten kennen, weil die Internationale Sprache keinem mehr und keinem weniger gehört. Deshalb fordern wir zum 25. Jahrestag dieser Menschenrechtsdeklaration:

Bleibt nicht länger gleichgültig! Macht erst mit der sprachlichen Gleichberechtigung!

J. Gießner

**Ruheständler kulturell betreut!
1 000 Veranstaltungen in einem
Jahr:**

Bunte Abende mit Tanz
Kaffeekränzchen
Kappenfeste
Advents- und Weihnachtsfeiern
Ausflugsfahrten mit Bahn, Bus und Schiff
gemeinsame Wanderungen
Werksbesichtigungen
Diavorträge in vielen Wissensgebieten
Seniorenturniere der Schachfreunde
Esperantistentreffen

**Woran sich Ruheständler allein und
in Gruppen beteiligen:**

an internationalen Ausstellungen,
Kongressen und Wettbewerben der
Freizeitgruppen

an Erholungs- und Besichtigungs-
reisen der Bahntouristik (300 Auf-
enthalte werden jährlich besonders
subventioniert)

am geselligen Leben in den Freizeit-
und Begegnungszentren (hier tref-
fen sie sich zum Kegeln, Skatspie-
len, Basteln, zur Gymnastik u. a.)

**Wie das BSW den einzelnen Ruhe-
ständler betreut:**

durch Beratung in Sprechstunden
durch Übermitteln von Glückwün-
schen an persönlichen Ehrentagen
und Überreichen von Geschenken
zu Weihnachten (die Esperantisten
erfreuen ihre Senioren mit Büchern
in der eigenen Sprache)

**Wo Ruheständler für Ruheständler
arbeiten:**

in Hamburg
Hannover
München
Nürnberg
Saarbrücken
Stuttgart

(in jedem dieser BD-Bezirke ist vom
BSW ein Ruheständler als Beauf-
tragter für die „Ehemaligen“ ein-
gesetzt. Er kennt die Bedürfnisse und
Nöte der Gleichaltrigen aus eigener
Erfahrung)

Ideen gesucht



Für unsere Ruheständler geschieht viel. Wir sind trotzdem der Meinung, es könnte möglicherweise noch mehr sein!

Und deshalb fragen wir nach Einfällen, nach Ideen. Nach solchen, auf die wir bisher nicht gekommen sind. Schreiben Sie uns ohne Scheu, falls Ihnen etwas einfällt, das im Rahmen der „kulturellen Betreuung“ realisierbar und in dem Katalog auf der nebenstehenden Seite noch nicht enthalten ist. Dabei darf der Begriff „Kultur“ weit verstanden werden. Nur für Sport sind wir nicht zuständig.

Uns soll alles willkommen sein, auch Ausgefallenes. Bisweilen läßt sich nämlich aus scheinbar utopischer Mütze der abgeschnittene und veränderte Zipfel irgendwie verwerten. In jedem Fall würden wir die Verwirklichung uns vorgetragener Ideen anstreben, sofern unsere finanziellen Mittel dies gestatten.

Teilnahmeberechtigt sind alle Eisenbahner und ihre Angehörigen, Ruheständler und Hinterbliebenen.

Einsendungen müssen bis zum 1. Februar 1974 eingegangen sein beim:
Hauptvorstand des BSW
6 Frankfurt (M), Karlstraße 4—6.

Schreiben Sie groß über Ihren Vorschlag das Wort „**Ideenwettbewerb**“ und vergessen Sie nicht, Ihre Postanschrift sowie die DB-Beschäftigungsstelle oder Betreuungsstelle anzugeben.

Und um das Mitmachen zu honorieren . . . ,
und damit Sie ein wenig Spaß an der Sache bekommen . . . ,
und weil das Ganze ein spielerischer Wettbewerb sein soll . . . ,
winken den besten Einfällen ein paar **Gewinne**, die sich sehen lassen können.

Den **Hauptpreis** hat die Bahntouristik Augsburg zur Verfügung gestellt:
... **14 Tage Südtirol!**

Aufenthalt mit allem Drum und Dran im nebenstehend abgebildeten Sporthotel „Sand in Taufers“

Und der Verband der Eisenbahn-Spar- und Darlehenskassen spendete für den guten Zweck
3 Sparbücher, auf die bereits
300,—, 200,— bzw. 100,— DM
eingezahlt sind.

Daß wir ein paar Trostpreise beschafft haben,
sei am Rande bemerkt.

Das Mitmachen lohnt sich doch in jedem Falle:
Immer und bei jedem Einfall profitieren
unsere Eisenbahner im Ruhestand.

Die Teilnahme geschieht grundsätzlich unter Ausschluß
des Rechtsweges. Alle Einsendungen gehen zur freien
Verwendung in das Eigentum des BSW über.



Die Dänischen Staatsbahnen als Schifffahrtsunternehmen

Zusammenfassung einer Fachvorlesung, original in Esperanto verfaßt von Gunnar Thuesen (Danske Statsbaner) in Zusammenarbeit mit der Generaldirektion der Dänischen Staatsbahnen, vorgetragen vom Autor am 18. Mai 1973 auf dem 25. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten in Aarhus, Dänemark.

Die Verkehrsverbindungen der neuerbauten Bahnlinien stellten die dänischen Eisenbahnen um 1870 vor außergewöhnliche Probleme wegen der primitiven Verhältnisse in den Häfen. Das zeitraubende und teure Umladen der Güter auf kleine, in Privatbesitz befindliche Schiffe mit unzureichendem Laderaum und ohne Bequemlichkeit für die immer größer werdende Zahl der Reisenden regte unumgängliche Verbesserungen an. Schon 1872 konnten die Danske Statsbaner (DSB) mit einem ersten Fährschiff den Verkehr über den Lillebaelt (Kleiner Belt) aufnehmen. Bei einem Fassungsvermögen für 5 Güterwagen und angemessenem Platz für Reisende taten die DSB mit der Fähre „Lillebaelt“ den ersten erfolgreichen Schritt zum Schifffahrtsunternehmen.

Die große Zahl der übergesetzten Passagiere und Güterwagen führte bald zum Bau weiterer Fährschiffe und zur Eröffnung neuer Fährlinien. In Anerkennung dieser Entwicklung gab das Parlament die Geldmittel frei für die Fährlinie über den Storebaelt (Großer Belt), noch heute der bedeutendste Übergang in Dänemark. Damit wurde es erst möglich, Bahnfrachten von Jütland und Fünen ohne Umladung direkt nach Seeland zu überführen, zum besonderen Nutzen des Verkehrs zwischen den einzelnen Landesteilen und der Hauptstadt Kopenhagen. Diese Modernisierung der öffentlichen Verkehrsverbindungen brachte nicht nur den Reisenden mehr Komfort, sondern wirkte auch entwicklungsfördernd auf die Industrie des Landes. Der Transportbedarf wurde immer dringlicher und brachte einen klaren Beweis für die Vorteile des Eisenbahn-Fähr-

verkehrs. In gleicher Weise entwickelten sich auch Bestrebungen um Fährlinien nach Schweden und nach Deutschland. Die DSB bemühten sich, ihre Fährflotte zu vergrößern und zu modernisieren, um ausreichende Kapazitäten bereitstellen zu können. Aber der ständige Druck eines anwachsenden Schienenverkehrs, noch verstärkt durch den neu dazugekommenen Autoverkehr, stellten andere und größere Transportaufgaben.

So war die Verkehrssituation, als der zweite Weltkrieg die Entwicklung plötzlich zum Stehen brachte. Die Nachkriegszeit stand vor den selben Problemen, nur mit dem großen Unterschied, daß einerseits die Fährschiffe inzwischen veraltet waren und unter starkem Verschleiß litten, andererseits aber die Transportbedürfnisse wie niemals vorher zugenommen hatten. So schnell, wie das Parlament die Mittel bewilligte, wurden neue Fährschiffe in Dienst gestellt. Um aber auch dem rasch anwachsenden Autoverkehr entgegenzukommen, war man genötigt, eigene Autofähren zu bauen und an einigen Plätzen sogar besondere Autofährlinien einzurichten.

Mit 34 Schiffen, worunter sich einige der modernsten Europas befinden, bedienen die DSB den innerdänischen und internationalen Fährverkehr als größtes Schifffahrtsunternehmen im dänischen Seeverkehr. Dort am Kleinen Belt, wo die DSB 1872 so bescheiden begonnen haben, gibt es jetzt zwei Brücken. Heute wird die Frage diskutiert: wo soll die neue Brücke gebaut werden? Über den Großen Belt zwischen Seeland und Fünen oder über den Öresund zwischen Dänemark und Schweden? wbr

Der vollständige Originaltext mit Illustrationen, statistischen Tabellen und einer Streckenkarte, zusammen in DSB-Mappe ist gegen Portoerstattung (intern. Antwortschein) zu erhalten bei: Gunnar Thuesen, Langekaervej 40, DK-2750 - BALLE-RUP, Dänemark.

Offenbach (Main)

Der Rührigkeit des Herrn O. Denk ist ein neuer Sprachkursus an der Volkshochschule in Offenbach zu verdanken. Als Auftakt diente ein gut besuchter Informationsabend am 11. September, auf dem der Stu-

dent R. Kvaschnak die Vorteile der internationalen Sprache herausstellte und auf die zahlreichen Zeitschriften, Bücher und Rundfunksendungen in Esperanto hinwies. Ein Ehepaar, das erst einige Unterrichtsstunden in Esperanto genom-

men hatte, berichtete über seine ersten positiven Kontakte mit ausländischen Esperantisten. Es folgte eine lebhaftige Diskussion, an deren Ende sich genügend Teilnehmer zum Anfängerlehrgang meldeten.

Vizito en la jarkunvenoj de BEFA kaj FFEA.

Meze en la historiplena batalkampo de Waterloo situas la monaĥinejo de Fichermont. Tie okazis la ĉi-jara jarkunsido de la Belga Esperanto Fervojista Asocio (BEFA) de la 29an de Septembro ĝis la 1an de Oktobro 1973. Inter la ĉirkaŭ 40 partoprenintoj, kiuj preskaŭ ĉiuj loĝis en la gastĉambroj de la monaĥinejo, estis ankaŭ fervojistoj el Francio, Nederlando kaj Germanio. Post kunsidoj, prelegoj kaj lumbildprezentado la sabato finiĝis kun festvespero kaj balo. Ni dancis ĝis noktmezo, sed ne kun la monaĥinoj.

La dimanĉo komenciĝis kun diservo kaj filmprezentado. Posttagmeze ni konatiĝis kun la historio de Waterloo. Ni vizitis la konatan monumenton. 226 ŝtupojn ni grimpis al la pinto de la terpiramido, sur kiu staras granda leono kaj de kie oni havas belan rigardon sur la ĉirkaŭaĵon. Poste en la vilaĝo ni vidis filmon pri Napoleono kaj la batalo de Waterloo.

London malgranda grupo funderis aŭtomobilekskurson tra Bruselo kaj al la Atomium kaj vizitis la ĉefvarstacion. La staciostro afable akceptis nin, regaligis per kafe kaj rakontis detale pri la trafiko kaj taskoj de tiu plej granda varstacio en Belgio. Post la tagmanĝo li montris al ni la varhalojn kaj la komputercentron, kie estas kalkulitaj la transportprezoj kaj konservitaj ĉiuj indikoj de la frajtkartoj.

Fine mi volas menci, ke dimanĉon tagmeze la fervojista orkestro el Bruselo venis al Fichermont kaj ludis gajajn melodiojn por ni. BEFA-prezidanto Lucien de Sutter kaj siaj helpantoj aranĝis interesan jarkunvenon kaj ili meritas, ke

estonte iliaj jarkunvenoj havu pli fortan viziton de eksterlandaj gastoj.

Ĉojige bone vizitata estis la jarkunveno de la Franca Fervojista Esperanto Asocio (FFEA). Venis preskaŭ la duoblo ol kutime. Ĉu estis la alloga urbo Parizo aŭ la ĝustatempa informado en la najbarlanda Esperantogazetaro, ke inter la 140 aliĝintoj estis 35 eksterlandanoj el 7 landoj? Pierre Robiolle, la prezidanto de FFEA, mem estis surprizita pri la alta nombro de la partoprenintoj. Li kaj siaj helpantoj zorgis afable, ke ĉiuj gastoj ricevis agrablan loĝejon. Kelkaj Esperantistoj ligis la restadon en Parizo kun parto de la ferioj kaj jam jaŭdon ni renkontis familion van Leuwen sur la Eiffel-turo. Sabaton, la 20an de Oktobro 1973, okazis la ĉefkunveno de FFEA, dume la eksterlandanoj vizitis la katakombojn de Parizo. Ni vespermanĝis en la stacidomo Montparnasse, unu el la grandaj modernaj konstruaĵoj, kiujn oni konstruis dum la lastaj jaroj ekster la historia kerno de Parizo. Bela travivaĵo estis la komuna vespera veturado per ŝipo sur la Seine.

Dimanĉon matene Pierre Robiolle malfermis la oficialan kunsidon. Reprezentantoj de la fervojo kaj de la sindikatoj salutis. Elfriede Kruse parolis por IFEF kaj la delegitoj de Aŭstrio, Belgio, Germanio, Italio, Nederlando kaj Svisio por siaj asocioj. Krome salutis la japanino Kazue Sugawara, kiu revenis al Eŭropo kaj kiun konas multaj el ni (vidu Bulteno 1/1970). La tradicia bankedo okazis 30 km norde de Parizo en Chantilly, kiun ni atingis per 2 aŭtobusoj. 3 horojn ni manĝis, trinkis kaj havis gajan babiladon kun niaj amikoj. Belaj afablaj filinoj de francaj Esperantistoj, blank-

verdaj vestitaj kun verdaj steloj sur la kufoj, alportis la elektitajn bongustajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Poste ni vizitis la kastelon de Chantilly. Vespere Johano Geroldinger montris 2 amuzajn filmojn pri la ski-semajno.

Do, kiu volas vivi kiel Dio en Francio kaj pasigi belajn tagojn en amika rondo, vizitu la jarkunvenojn en nia najbara lando. Schindler

Nekrologo

En la aĝo de 84 jaroj mortis la 25-an de Septembro 1973 nia membro

Hans Feilner

el Nürnberg (Nurenbergo). Ek de 1923 li estis aktiva esperantisto. Li ekzamenis kandidatojn kaj gvidis dekdu kursojn por komencantoj kaj progresantoj kun bonaj sukcesoj. Dank' al sia scipovo li aranĝis la instrukciojn tiel pozitive, ke la lernintoj lernis favore kaj entuziasme. Regule, ankaŭ en la lastaj jaroj, li vizitis UK, fakajn kaj regionajn kongresojn kaj preskaŭ ĉiujn kunvenojn en Nord-Bavarujo. Li estis fondinto de la fervojista Esperanto-grupo Nürnberg. Okaze de lia 84-a naskiĝtago, la 26-an de Juni 1973, vizitis la distriktkomisiito Hans Müller nian veteranon en maljunulejo en Nürnberg kaj transdonis salutojn kaj bondezir-ojn de GEFA kaj de la fervojista Esperanto-grupo Nürnberg kaj preparis artikolon pri la „Veterano Feilner“. Dum la jarkunveno en Koblenz ni aŭdis, aparte tragike, pri la foriro de nia altsatata membro. Li restos nia amiko, kiun ni ne forgesos. La entombigo okazis la 28-an de Septembro en Nürnberg. Li ripozu en paco.

GEFA-estraro

58a UK en Beograd

La ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto okazis en Beograd, la metropolo de Jugoslavio, inter la 28. 7. kaj 4. 8. 1973. Aliĝis ĉ. 1 600 kongresanoj el 42 landoj. Ne venis ĉ. 100, sed la nombro de la nealiĝintoj estis supezeble pli granda. Pro tio, ke kvin kontinentoj estas reprezentitaj, rezultis eksterordinare multnacia bildo. Kiel kongresejo funkcias modele la sindikata domo en la urba centro. Dum la impona inaŭguro salutis la kongreson eminentuloj el publika kaj politika vivo, ankaŭ reprezentantoj de eksterlandaj registaroj, bedaŭrinde ne tiu de nia lando.

Apartan mencion meritas la aranĝoj por la fervojistoj (31. 7.), unue la kontaktkunveno kun 42 kongresanoj el 12 landoj, dum kiu prelegis inĝ. L. Sekereš (Novi Sad) pri Integra Transporto. Samtage okazis en la kadro de la Internacia Somera Universitato (ISU), unuafoje en ties historio, prelego de fervojisto, nome de magistro G. Srediĉ (Beograd) pri la „Ekonomieco de transporto de varoj en konteneroj“. Poste sekvis vizito al la fervoja muzeo en la generaldirekcio de la Jugoslavaj Fervojoj kun interesa diskuto kaj regalo. La vespero finiĝis per gaja kunestado en restoracio de la antikva kvartalo, kie svarmis miloj da pasantoj en brilumitaj stratetoj, feliĉe senaŭtaj. Tiu tago estis kvazaŭ volonte vizitita insulo inter la amsa kongresanaro.


La UK ofertis kompreneble abundon je programeroj. Ofte ne estis facile elekti inter organizaj, kulturaj, distraj aŭ sciencaj aranĝoj. El la programo de la folkloro vespero restis en specifa memoro la danco sen

muziko. Bone plaĉis ankaŭ la moderna teatraĵo prezentita de zagrebaj studentoj. La balo ne plenumis ĉies guston. Vojaĝagentejo organizis plurajn rondveturojn kaj tuttagajn ekskursojn al diversaj celoj per aŭtobusoj. Tiamaniere oni konatiĝis pri la bela ĉirkaŭaĵo kaj la historio de Serbio kun ĝia ĉefurbo, kie precipe la lasta milito postlasis kruelajn ŝpurojn. Post la UK kelkaj fervojistoj partoprenis ankaŭ la postkongreson en Aten/Grekujo. Sed la plej multaj vojaĝis reen. Estus interese ekscii, kiom kongresanoj eluzis la fervojon. Dank al plejofte agrabla vetero kaj bona prizorgado de LKK kaj niaj gekolegoj la kongrestagoj estis belaj. W. B.

Esperanto-veteranoj.

Arthur Benders

naskiĝis 1898 en Saksio. Post la militservo li fariĝis en 1919 volontulo en la tiama regna armeo, interalie partopreninte batalojn en Berlin. Li ekŝiĝis en 1929 en Konstanz. Ankoraŭ soldato, li lernis Esperanton en 1926



Arthur Benders

per radiokurso de Stuttgart, vizititis uniforme la 18-an GEA-kongreson kaj helpis fondi internacian Esperan-

to-societon en Konstanz/Kreuzlingen (Svisio). Post ekŝiĝo el la armeo li fariĝis ekzamenita kursgvidanto kaj gvidis kursojn en Konstanz, Singen (Hw.) kaj Lindau. Lia ekspozicia aranĝo en fenestro de meblovendejo konatiĝis en Konstanz la preterpasintojn pri Esperanto. En 1930 komencinte fervojistan karieron en Rosswein (Saksio) li aranĝis baldaŭ tie Esperanto-kurson. Kolizio kun naciaj partianoj rezultigis translokiĝon al Zittaŭ en 1935.

Dua kolizio kaŭzis pluan ŝanĝon de la deorloko kaj en 1942 enarmeigton. Post tri jaroj de militpartopreno en orientaj landoj kaj post mallonga militmallibereco li aventuro revenis al sia familio en Zittaŭ. La feliĉo de reveno daŭris nur ĝis 1949.

La tieaj aŭtoritatuloj ekŝiĝis lin el la fervoja deĵoro. Tial li rifuĝis okcidenten. Tamen daŭris ses jarojn, ĝis kiam li povis denove deĵori en Mannheim. Spite al tio li gvidis kurson por fervojistoj en Karlsruhe. Unu el liaj nunaj ŝatokupoj estas sendi legantoleterojn al gazetoj koncerne Esperanton. Krome li verkas versojn kaj verstradukojn.

Pendola sistemo

La rezulton de pasintjaraj eksperimentoj faritaj de B. R. prezentas ŝajne revolucia pendola vagonosistemo, kiu ebligas al la „APT“-trajnoj sur jam ekzistantaj trakoj atingi rapidecojn ĝis 150 mejloj hore. Malgraŭ tiu rapideco la vojaĝantoj havos komfortan kaj agrablan vojaĝon. Tiu unika pendola sistemo estas rezulto de intensaj studoj pri la veturkaraktero de relveturiloj dum altaj rapidecoj.

26-a IFEF-Kongreso en Taragona de la 11-a ĝis la 17-a de Majo 1974. La aliĝilon estas enmetita.

British Rail rapidas en la estonton

Ankaŭ en Britujo same kiel en Germanujo, Francujo kaj aliaj landoj oni eksperimentas per ultrarapidaj fervojoj por certigi al la fervojo ankaŭ estonte bonan bazon inter la trafikentreprenoj kaj samtempe plenumi la taskon de nedamaĝa amastransportilo en la sekvontaj dudek jaroj.

En Anglujo oni evoluigis du sistemojn kaj post longaj eksperimentoj nun prove veturas. Unuflanke momente la prototipo de la „High Speed Train (HST)“ (ultrarapida trajno) estas uzata en la pasaĝertrafiko sur la ĉeflinio ĉe la orienta marbordo. Tiu trajno atingas la maksimuman rapidecon de 125 mejloj hore (100 mejloj hore egalas al 160 kilometroj hore) kaj konsistas el sep pasaĝervagonoj. Post mezo de 1974 oni antaŭvidas instali 30-40-on da tiaj trajnoj jare.

155 mejlojn hore

Aliflanke oni entrafikigos la „Experimental Advanced Passenger Train (APT-E)“ (progresiva pasaĝertrajno) kun multaj teknikaj novaĵoj. La venontajn monatojn oni prove veturos ĝis 155 mejlojn hore kaj prototipon de 1975 oni uzos en pasaĝertrafiko.

Planante la „HST“ kaj „APT“-sistemojn oni devis konsideri ke tiuj trajnoj surbaze de jam ekzistanta trakaro atingu rapidecojn ĝis 100 mejloj (t.e. 160 kilometroj) hore dum la kostoj po-sidlokaj restu sur la nivelo de la ordinare kutimaj.

Finita ĝis 1985?

La „APT“ kaj „HST“-sistemoj ebligas progreson por ĉirkaŭ dek jaroj. La „APT“-sistemo estos supozeble enkondukata ekde 1978 en la

interurban pasaĝertransporton. Ĝis 1985 la ŝanĝo al la rapidaj trajnoj de unu aŭ alia sistemo estu finita. Komence la maksimuma rapideco estos 125 mejloj hore, sur taŭgaj trakoj oni altiĝos ĝin iom post iom ĝis 155 mejloj hore.

La unua linio, kiu profitos de la „ATP“-sistemo, estas la 402 mejlojn longa ĉeflinio London - Glasgow. Oni atendas mallongigi la veturtempo de nun minimume 359 minutoj al komence 247 min. kaj fine al 239 minutoj. La 189 mejlojn longa linio London - Manchester, por kiu la plej rapidaj trajnoj nun bezonas 151 minutojn, baldaŭ estos trapasata en 118 resp. 113 min., la veturtempo por la linio London-Bristol (119 mejloj) mallongiĝos verŝajne de 100 al 70 resp. 65 minutoj.

Teknikaj problemoj kaj altaj kostoj

Kompreneble ĝis la definitiva seria konstruado estas solvendaj ankoraŭ diversaj teknikaj problemoj kaj pagendaj ankoraŭ altaj kostoj. Tamen ankaŭ por la Brita Fervojoj la estonteco jam komenciĝis. Kaj la plej granda revo post konstruo de la kanaltunelo (nur reltrafiko) London - Paris 2 horoj 40 minutoj, London-Frankfurt 4 horoj 30 minutoj.

Laŭ EISENBAHNER RUND-SCHAU tradukis gbr

Homoj kaj Nomoj

Prezidanto kaj sekretario de GEFA, Joachim Gießner kaj Elfriede Kruse, post komuna tagmanĝo kun la aŭstralia ambasadoro, Ralph Harry, en la kunvenejo en Koblenz, veturis en la ambasadora aŭtomobilo kun la signo CD 0-19-1 al la hotelo. La ambasadoro portis la oran honoran insignon de Sudbavara Esperanto-Ligo.

Die 15. internationale Skiwwoche (IFES 74) findet vom 9. bis 16. Februar 1974 auf Mala Kopa (1450 m) nahe Slovenj Gradec im Pohorjegebirge (Jugoslawien) statt. Slovenj Gradec liegt etwa 70 km westlich von Maribor entfernt, mitten im malerischen Mislinjatal. Zahlreiche Pisten begeistern den Skiläufer. Neuerbaute Lifte befördern Anfänger, Fortgeschrittene und anspruchsvolle Skiläufer. Bis zu 2 km lange Abfahrten führen von 1500 bis zu 1000 m Meereshöhe herab. Das Domizil Haus „Partizanski“, ist auch im Winter mit dem Auto zu erreichen. Es stehen 50 Plätze in 2- und 3-Bettzimmern zur Verfügung. Verlängerung des Aufenthalts um 10, 12 oder 14 Tage ist möglich. Die Tagespension beträgt einschließlich Liftgebühr 110 bis 115 Dinare (je nach Zimmerkategorie). 250 Dinare sind gleichzeitig mit der Anmeldung zu zahlen.

Anmeldungen baldmöglichst an Jovan Mirkovič-Filipičeva, 21-62000 Maribor (Jugoslawien), Bankkonto: 518-620-I-32002/10/181 KB Maribor.

Wer Interesse an der Skiwoche hat, wird gebeten, sich mit dem Jugendbeauftragten Werner Heimlich, Ga Soltau (Diensttelefon 949/850/113) in Verbindung zu setzen. E. Kr.

Nekrologo

Hazarde ni eksciis, ke nia longjara fidela membro


Richard Päsler,
Limburg/Lahn

post mallonga malsano la 9an de marto 1973 forlasis nin por ĉiam.

Al la edzino ni ankoraŭ sincere kondolencas. Al la mortinto ni konservos bonan memoron.

Esperanto-veteranoj.

Eks-ĉefinspektoro **Gößmann**, naskita la 10-an de Decembro 1901, esperantiĝis en Oktobro 1921 en Nürnberg (Nurenbergo). Ek tiu tempo li estis membro de la „Esperantista Klubo Nürnberg“ jam fondita en 1888. Tiu klubo estis la unua Esperanto-organizo ne nur en Germanio, eĉ en la tuta mondo. Ankaŭ kelkaj fervojistoj estis membroj. La



BAmtn i. R. Gößmann

unua granda impreso por li estis la Universala Esperanto Kongreso 1923 en Nürnberg kun 4963 partoprenintoj. Ek de Novembro 1955 ĝis fino de la jaro 1967 li estis distriktkomisiito kaj estro de la fervojista Esperanto-grupo en sia hejmurbo. Ofte la fervojista-grupo festis kun kune la loka esperantistaro la Zamenhof-feston en la festsalonego de la trafik-muzeo. Entute nia veterano vizitis 20 Esperanto-kongresojn.

Anschriftenänderung:

TBAmtn Krüger, Bw Heilbronn (Bez. Stuttgart) Basa 952/822/328

Wiesbaden

Die Gewerkschaft Deutscher Bundesbahnbeamten (GDBA) lud zu ihrem 13. Gewerkschaftstag als Ehrengast auch die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahnsozialwerk (GEFA) ein. Herr Barnickel (Frankfurt) vertrat GEFA auf der Eröffnungs - Veranstaltung am 10. September in der Rhein-Main-Halle in Wiesbaden und beim anschließenden Empfang der Ehrengäste im Hotel Schwarzer Bock.

Und auch das ist erfreulich

Die Sozialdemokratische Partei Italiens (SPI) hat dem

italienischen Parlament einen Gesetzentwurf zugeleitet, der die Einführung der internationalen Sprache Esperanto an den Schulen fordert. Außerdem hat die SPI ihre Schwesterparteien in anderen Ländern, u. a. auch die SPD, aufgefordert, sich mit dem Problem des Esperanto als internationales Verständigungsmittel zu beschäftigen und der SPI ihre Ansicht hierzu mitzuteilen. Die SPI meint, daß der allgemeine Gebrauch der Internationalen Sprache das Gemeinschaftsgefühl der europäischen Menschen erheblich stärken dürfte.



Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝojigan Kristnaskon kaj sukcesplenan Novan Jaron.

Redaktfino por n-ro 1/1974 estas la 15. 1. 1974.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Grab, 565 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck / preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanto Fervojista Asocio.